


# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

<http://satesperanto.free.fr/> \*\*\* retadreso: [satesperanto@free.fr](mailto:satesperanto@free.fr)



Junio 2005 76-a jaro, n-ro 6 (1200)  
MENSUEL / MONATA  
ISSN 1163.0442 Prezo: 5 €



## Bonvenon al Zagrebo

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

## El la redaktejo...

Karaj, tiu ĉi numero de Sennaciulo estas 1200-a ekde sia aperkomenco, kaj 278-a redaktita de via aktuala redaktoro. Tio do estas eta jubileo. Ĝi estas ankaŭ la lasta numero antaŭ nia grava kongreso en Zagrebo. Bedaŭrinde malmultaj el vi aliĝis al la kongreso kaj ĝi estos unu el la plej malgrandaj kongresoj en la historio de SAT. La kialon mi ne scias, sed tio estas tre grava por nia Asocio. Do, restas ankoraŭ unu monato kaj ankoraŭ eblas tion ŝanĝi. Montru ke la sorto de SAT estas grava por vi. Krome, via redaktoro garantias al vi ke lia naskiĝurbo meritas vian viziton, kaj ke vi pasigos tre agrablan kaj belan kongreson en nia amika kaj kamaradeca etoso. Ne plu hezitu!



Via redaktoro.

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.

Retadreso: satesperanto@free.fr.

TTT-paĝoj: <http://satesperanto.free.fr>

Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39

BIC: PSSTFRPPPAR

Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.

Ĉefredaktoro: Kreŝimir Barkoviĉ

Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

□

Imprimé par : EDRB, Avenue Mozart, FR-75016 Paris.

Aperas monate - Mensuel.

Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER

Abonnement annuel/jara abono France 55 €.

Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution.

Commission Paritaire n° AS-74399

Limdato por ricevo de kontribuajoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

## KANDIDATOJ POR LA P.K. DE SAT



Jacques **BANNIER** (JOBO) - Matrikulo 23149. Kandidato de Pariza SAT-Rondo. Esperantisto kaj SAT-ano ekde 1947.



Kreŝimir **BARKOVIĉ** (Kreŝo) - Matrikulo 31978, kandidato de Pariza SAT-Rondo. SAT-ano ekde 1972.



Martin **BUSTIN** (Marteno) - matrikulo 32539, individua kandidato. SAT-ano ekde 1978. Eksa peranto de SAT. Organizis

SAT-kongreson en Alicante.



Guy **CAVALIER** - matrikulo 31976, kandidato de Pariza SAT-Rondo. SAT-ano ekde 1972.



Gerard **LIEBLANG** - matrikulo 32343, kandidato de Pariza SAT-Rondo. Iama PK-ano. SAT-ano ekde 1976.



Vinko **MAR-KOV** - matrikulo 35297 - kandidato de Pariza SAT-Rondo. SAT-ano ekde 1997.



Arturo **PRENT** - matrikulo 31123, individua kandidato. SAT-ano ekde 1964.



Thérèse **SABATIER** (Tereza) - matrikulo 32652, kandidato de Pariza SAT-Rondo. SAT-ano ekde 1979.



Jacques **SCHRAM** (Jakvo) - matrikulo 34781, individua kandidato. SAT-ano ekde 1993.



Malgraŭ la alvoko en Sennaciulo nur tiuj gekamaradoj anoncis sin kiel kandidatoj por la venonta P.K. Temas pri la aktualaj PK-anoj plus k-do Lieblang kiu jam antaŭe estis PK-ano. Ĉu tiuj gekamaradoj kiuj kritikis la agadon de la PK ne volus mem transpreni tiun respondecon? Ili prezentu sin dum la kongreso en Zagrebo.

### ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la CD en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx = ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.


La Redakcio

## Abomenaĵoj de la milito

# Por la ekzemplo



Por la ekzemplo la franca armeo mortpafis siajn proprajn soldatojn dum la unua mondmilito (1914-1918).



*Teruraĵo de la milito*

Freŝdate franca televidostacio prezentis raportaĵon pri mortpafitaj francaj soldatoj por fari ekzemplojn. La realigado de tiu filmo estis ebla ĉar, antaŭ la fino de la periodo de 100 jaroj dum kiu estas malpermesite konsulti la militajn arkivojn, emerita generalo humanista (treege malofta eco ĉe la profesio) intervenis kaj malfermis la hontindan dosieron de « mortpafitaj soldatoj por la ekzemplo ». Tiu generalo kaj lia skipo faris titanan laboron. Ili konsultis, studis, analizis 140 000 dosierojn de militkonsilioj. La konsultado de tiuj dosieroj permesas hodiaŭ diri ke la milita justico, inter septembro 1914 kaj junio 1918, kondamnis proksimume 2500 soldatojn al mortpuno kaj ordonis 550 ekzekutojn. Alia fonto de informoj (libro : « La damnitoj de la milito », aŭtoro : Roĝero Monclin)

*Sennaciulo, junio 2005*

indikas ke, oficiale, la nombro de kondamnitaj kaj mortpafitoj dum la milito 1914-1918 estas 1637.

### Kial tio ?

#### 1 – Memkripligoj

Kiam, la unuan tagon de aŭgusto 1914, la franca armeo komencis la ĝeneralan mobilizadon, ĝi amase rekrutis junulojn, kiuj havis nenian sperton pri la milito. Dum la unuaj bataloj fronte al germana potenca armeo, kiu rapide direktiĝis al Parizo, la francaj junaj rekrutoj malkovris la veran realecon de la milito. Oni diris al ili «ni estos en Berlino je Kristnasko» kaj oni trudis al ili kontraŭi la germanan armeon por ke ĝi ne eniru en Parizon. Vundi sin per kuglo en mano aŭ piedo estis rimedo por malproksimiĝi de la fronto de bataloj. Por haltigi tiujn memkripligojn, francaj stabo kaj registaro ordonis apliki severajn sankciojn. «Generalaĉo» Joffre, kiu poste estis nomata marŝalo de Francio, tiam skribis la jenan noton : «Fari ekzemplojn, kiuj estas nepre necesaj». La teruraj rezultoj konfirmis la aplikon de tiu barbara noto. ( Kiam ni vidas ke multaj francaj urboj donis la nomon «Joffre» al sia strato, ni estas naŭzigitaj ).

#### 2 – Ekzekutoj, dizertoj

Iom post iom la milito instaliĝis en la tranĉeoj. Ifoje la distanco inter

la francaj kaj germanaj tranĉeoj estis malpli ol dudek metroj. Eliri de la tranĉeoj estis certa morto. Komandi eliron de la tranĉeoj estis frenezo, eĉ kulpo, tamen francaj oficiroj trudis al soldatoj tiajn sturmojn. Kiam soldatoj rifuzis obei al la ordono, iuj oficiroj hazarde mortpafis kelkajn el ili por la ekzemplo. Tiuj soldatoj estis mortigitaj sen kunveno de militkonsilio, tial la nombroj 550 kaj 1 637 estas certe malsuperaj al la reala nombro de mortpafitoj, kiel tio estas skribita en la libro «La damnitoj de la milito».

Aliaj soldatoj elektis esti kaptitaj de la germana armeo aŭ dizerti okaze de forpermesoj, prefere ol reveni al la fronto. Sed, kiam la armeo retrovis ilin, la militkonsilioj kondamnis ilin al la mortpuno.

#### 3 – Ribeloj

Post milito de pozicioj en tranĉeoj dum pluraj monatoj, en 1917 la franca stabo decidis ataki por rekonkeri la okupitan grundon per la Germanoj. Dum tiuj ofensivoj 180 000 francaj soldatoj mortis en 3 semajnoj. Tiam, kiam la antaŭaj ribeloj estis precipe individuaj ribeloj, en 1917



*Monumento por la paco - "Packolombo"*

la ribeloj estis kolektivaj. Kompletaj regimentoj rifuzis iri al la fronto. Evidente la kontraŭa reago de franca stabo estis terura : hazarde oni elektis soldatojn ĉe la ribelaj regimentoj, tuj militkonsilioj kondamnis ilin al